



«Le Groupe Esperanto du Maine» salutas vin !



Bonvenigaj vortoj

*«Ne la purkoruloj evitas pluvegon
Sed homoj ekipitaj per pluvombrelo.»*

A. France

Enhavo

- Sarta abolisto: Levasseur p. 1.
- Pri la difino de genocido p. 2.
- Hiroŝima (lasta parto) p. 3.
- Kuirarta specialaĵo : Rijeto p. 4.



Mocioj de Levasseur (el la departamento Sarthe) kaj de Delacroix (el la departamento Oise), petante la konsenton pri liberigo de la neblankuloj dum la kunsido de la 16a de pluviozo jaro II (la 4a de februaro 1794)



LEVASSEUR : Mi petas ke la Konvencio, ne cedante al iu entuziasma reago, sed al la principoj de justeco, fidela al la Deklaracio de la Homaj Rajtoj, tuj dekretu, ke sklaveco estas aboliciita sur la tuta teritorio de la Respubliko. Domingo estas parto de ĉi tiu teritorio kaj tamen ni havas sklavojn en Domingo. Tial mi petas, ke ĉiuj homoj estu liberaj sen distingo pri haŭtkoloro.

DELACROIX : Laborante pri la konstitucio de la franca popolo, ni ne atentis al la kompatindaj neblankuloj. La posteularo havos gravajn riproĉojn al ni pri tio, sed ni devas ripari tiun malpravon. Estas tempo agi laŭ la principoj de libereco kaj egaleco. Eĉ se ni ne agnoskas sklavojn en Francio, ĉu ne veras, ke neblankuloj estas sklavoj en niaj kolonioj? Ni proklamu la liberon de la neblankuloj !

Genocido: oficiala difino

Post la II-a mondmilito, la plimulto de la landoj difinis genocidon, pro ĝia singardo kaj ĝia sankcio. Jen la difino de 1948, konfirmita en 2018.

Genocido [1] oficiala difino [2]

«La genocido estas difinata kiel iu ajn akto, ĉi sube, farita je la intenco detrui, tute aŭ parte, iun nacian, etnan, racan aŭ religian grupon, kiel grupo:

A) -murdo de membroj de la grupo;

B) -grava atenco al la fizika aŭ mensa sano de membroj de la grupo;

C) -intenca subpremo de la grupo al kondiĉoj de vivo devigante okazigi ĝian fizikan detruon, tute aŭ parte;

D) -rimedoj celante bremsi naskojn ene de la grupo;

E) -deviga kidnapo de infanoj de iu grupo al alia grupo.»

Ĉiuj legantoj povos pripensi kiam eblas paroli pri genocido.

<https://www.un.org/en/genocideprevention/documents/Appeal-Ratification-Genocide-FactSheet-FR.PDF>

[1] Genocido aŭ popolmurdo, *gentomurdado*, amasmurdo de civitanoj

[2] Difino de ONU (*Unuiĝantaj Nacioj*) en 1948-2018.



Dum la dua mondmilito troviĝis tie la koncentrejo de Drancy. (Bildo de la germanaj arkivoj)

De la supro de la monteto oni rigardas centrajn stratojn de Hiroŝima (la tutan cirklon de dukilometra radio ĉirkaŭ la “eksplodcentro”). Kaj en ĝi troviĝas preskaŭ ĉiuj ĉefaj konstruaĵoj de armeaj, ŝtataj, publikaj institucioj, lernejoj, bankoj, kompanioj, magazenoj, loĝejoj. Ankaŭ la universitato, en kiu estas mia laboratorio kaj ankaŭ mia luita domo, el kiu mi foriris tiun ĉi matenon kaj en kiu restas miaj edzino kaj infanoj.

Spite de tio, Hiroŝima ensaltinta en miajn okulojn en la momento estis nur amaso nigra de bruligita tero. Nenio sin trovis. Estis nur ruino de bruligita nigra, ebena ĝis la horizonto! Teruraj flamoj ankoraŭ furiozantaj de lokoj al lokoj! Inter ili dismetataj nur konturoj de betonaj konstruaĵoj starantaj kvazaŭ grandaj tombsignoj aŭ fantomoj !

Tuj antaŭ la okuloj kuŝas montoj de Koi, kiuj estas en la distanco de kvar kilometroj kaj faras okcidentan limon de la urbo kontraŭ Hiŝijama.

Mi rimarkis ĉirkaŭ mi, ke en la surmonta placo, kie mi staras, svarmas plenplene “mortintoj en Infero” similaj al kiuj mi jam antaŭe renkontis.

De mia kapo malaperis for miaj edzino, infanoj kaj ankaŭ laboratorio. “Kio okazis efektive?”

Baldaŭ mi trovis junan oficiron ŝajne el “studentoj- soldatoj” en la ĉirkaŭaj “mortintoj en Infero”.

“Kio okazis efektive?”

Mi demandis lin alproksimiĝinte pretervole.

“Hej?”

La oficiro kvazaŭ ŝanceliĝinta en momento enrigardis min. En tiuj tagoj Hiroŝima, unu el malmultaj urboj ankoraŭ ne difektitaj de bombardoj, estis la sidejo de la stabo de la Dua Ĝenerala Korpuso por “1a definitiva batalo en la propra lando” kaj estis la centro de tiuj funkcioj de “Japana Armeo”. En tia Hiroŝima oni plej severe gardis sin kontraŭ spionoj. Rimarkinte ke, “li suspektas min”, mi tuj prezentis mian nomkarton kun titolo de mia profesio.

“Jen estas mia nomo...”

La oficiro ŝajne iom mildigis sian mienon streĉitan.

“Mi ankaŭ estas gradigito de la naturscienca fako...”

Post momenta silento li flustris al mi.

“Mi supozas ke ĝi estas atombombo”

“Atombombo!”

Mi estis ŝokita ankoraŭfoje.

Mi rememoris vortojn aŭskultitajn antaŭe de iu,

« Per alumetskatolo da bombo Monto Huĝi estus forblovata. »

- Estas sendube...

- La milito jam finiĝos per tio...

Mi murmuris en mia koro pro ia liberigita sento.



Ĉu vi konas tiun manĝaĵon: rijeto ?

En Piv 2020, oni povas legi :

« *rijeto* Manĝaĵo konsistanta el hakita porkaĵo aŭ kokidaĵo, miksitaj kun graso kaj tre longe stufita. »

Reta-vortaro aldonas la devenan lokon : la urbo Le Mans (Manso).

<https://www.reta-vortaro.de/revo/index-malnova.html>

Manĝaĵo, konsistanta el hakita porkaĵo aŭ kokidaĵo, miksitaj kun graso, kutime manĝata ŝmirita sur pantranĉaĵo: Manso estas fama pro sia fama Katedralo Sankta Juliano, kaj ankaŭ pro la rijetoj.

Vikipedio donas ankaŭ informojn pri Etimologio kaj historio :

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Rijeto>

La franca vorto rillettes estis unue uzita en 1845. La vorto estas la diminutivo de la malnovfranca vorto rille "tranĉaĵo de porkaĵo", unue uzita en 1480.

Tamen, la plado mem ekzistis dum jarcentoj antaŭ la unua uzo de la vorto. La 16-a-jarcenta verkisto Rabelezo jam priskribis la rijeton kiel la "brunan konfitaĵon de porkaĵo" (france « brune confiture de cochon »).



Sed neniuj fontoj klarigas de kie venas la ideo pri preparado de rijetoj. Ĉu vi volas scii?

Fakte, ekde la fino de Mezepoko, kiam la movado de varoj kaj homoj denove pli faciligis, komercaj ligiloj kunigis Bretonion kaj Parizon. En Bretonio, porkoj jam estis bredataj. Kaj en Parizo... ili jam estis ŝatataj.

La vojaĝo de la bredaro al la konsumloko okazis piede. Farmistoj pelis gregojn da porkoj al la granda urbo. La vojaĝo daŭris longe. La plej malfortaj bestoj mortis survoje.

Le Mans situas duonvoje inter Bretonio kaj la pariza regiono. Buĉistoj en Le Mans ricevis grandan kvanton da viando, kiun ili devis rapide prilabori. Ne estis sufiĉe da tempo por fari ŝinkon, kolbasojn, ktp.

La plej simpla metodo estis kuiri longe pro higienaj kialoj, poste forigi la ostojn kaj plenigi malgrandajn potojn. Oni diras, ke tiel naskiĝis rijeto.

Multaj kuirartaj specialaĵoj (konfitaĵo, fromaĝo, sekfiŝo, piklaĵoj, ktp.) origine estis manieroj konservi manĝaĵojn, kiuj alimaniere estus malŝparitaj.

.....
Le G.E.M (Groupe Espérantiste du Maine) a été créé en mai 1991 ouvrant son horizon au département de la Mayenne. Il a modifié récemment son intitulé et se nomme depuis « Le Groupe Espéranto du Maine ».

Ou

La GEM (Majna Esperantista Grupo) estis kreita en majo 1991, vastigante siajn horizontojn al la departemento Mayenne. Ĝi ŝanĝis sian nomon kaj de tiam nomiĝas "La Majna Esperantista Grupo".
.....